

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



57a jaro n° 2
marto - aprilo 1965

Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

Redakcio: JAUMOTTE MAURICE
ROOSE FERNAND, SINT-KLARADREEF 59, BRUGGE TEL. (050) 319.81
MAERTENS GRÉGOIRE
POUPEYE CHARLES

Kunlaborantoj al regulaj rubrikoj:

DR. POL DENOËL
DURWAEL IVO
ISERENTANT ROGER
DE CUYPER GEORGES

Administrado: TERRYJ J. RAAPSTRAAT, 72 GENT



ASOCIO sen profita celo

sidejo & prezidantejo

DEBRUYNLAAN 44, WILRIJK TEL. (03) 377758

HONORA PREZIDANTO

KEMPENEERS PAUL

HONORA VICPREZIDANTO

SIELENS HENRI

ĜENERALA PREZIDANTO

JAUMOTTE MAURICE

PREZIDANTOJ

DEBROUWERE GERARD, MAGDALENASTRAAT 29 KORTRIJK
DR. DENOËL POL, 20 RUE V. RASKIN LIÈGE

UNUA VICPREZIDANTO

ROOSE FERNAND

VICPREZIDANTINO ŝakestrino por kongresoj

PLYSON J. 23, PLACÉ E. FLAGÉY, BRUSELO 5 P.K. 236804

VICPREZIDANTO ŝakestro pri teknikaj rimedoj

VERSTRATEN JULES, SINT BERNARDSE STEENWEG 1078 HOBOKEN

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDINGVA REGIONO

MAERTENS GRÉGOIRE, PRINS LEOPOLDSTR 51, ST-KRUIS TEL. (050) 34935

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO

DE CUYPER GEORGES, 66, RUE DE DORLODOT, MONCEAU SUR SAMBRE

KASISTINO


TERRYJ JULIETTE, RAAPSTRAAT 72, GENT

poŝtkonto de B.E.F.: 1634.34 RAAPSTRAAT, 72, GENT

ĉefdelegito de universala esperanto-asocio

FR. SCHELLEKENS, FRANS HENSSTRAAT, 44, ANTWERPEN 2
P.K. 9051.25

OOSTENDE



nia kongresurbo

mallonga

historia

superrigardo

La Flandra marbordo ne ĉiam lokiĝis kie ĝi estas nun.

En la 5a jarcento la mar-akvonivelo plialtiĝis tiel ke la akvo invadis la kontinenton ĝis distanco de proksimume 12 Km., do ĝis linio ± paralela al la nuna marbordo, kaj atinganta la regionon de nuna urbo Brugge. La tuta teritorio, iam sub la akvo, estas nun la tre fruktodonaj Polderoj. Multaj historiistoj pensas ke la restaĵo de la iama Sünriverego, norde de Knokke-Zoute, kaj la Izer-rivero ĉe Nieuwpoort (= nova Haveno), kaj la endigitaj «Moe-ren» (= marĉoj) sur la landli-

mo de Flandrujo en la Belga ŝtato kaj Flandrujo en la Franca ŝtato, estas tri restaĵoj de tiu marosuperfluo. Post la 5a jarcento la akvo tre malrapide retiriĝis. Pli kaj pli da insuletoj ekestis kiujn la monaĥoj endiĝis. Sur la plej orienta parto de unu tia insulo, fiŝkaptistoj de Mariakerke (= preĝejo de Maria) konstruis fiŝhavenon OOSTENDE. La nomo signifas: «orienta finaĵo». Tiel oni kapablas kompreni la nomon se oni rigardas sur landkarto kaj rimarkas la situon de la vilaĝoj Westende (= okcidenta finaĵo), Middelkerke (= preĝejo en la mezo) kaj Oostende. Ili estis la okcidenta, meza kaj orienta partoj sur tiu insulo. La dokumentoj — ek de la 9a jarcento — mencias preskaŭ ĉiam Oostende Testerep aŭ Westende Terstrep (= sur la terstrio).

En 814 la vilaĝo Oostende estis posedaĵo de la abatejo de Sint Omer en Franca Flandrujo). Ĝia haveno restis taŭga ĝis la duono de la dekdua jarcento. Tiam la sablo tro plenigis la markolon (ĉar, ja, la maro konstante kaj daŭre retiriĝis). Grafo Filipo de Elzaco konstruigis novan havenon: Zandhove (= Sabloĝardeno; la nuna Nieuwpoort). La fosado de nova haveno ree bonigis ĝin tiel ke en la 13a jc. ĝi estis floranta fiŝisthaveno. Antaŭe, grafo Roberto la Friso, estis konstruiginta la St. Petropreĝejon en 1072. En 1267 grafino Margareta de Konstantinopolo altrangigis la lokon al la rango de « urbo » kun ĉiuj koncernaj rajtoj kaj privilegioj. 1349 kaj 1404 du egaj akvosuperfluoj detruis grandparte la dunojn kaj la urbon. Fine, en 1445, grafo Filipo de Burgundio donis la rajton konstrui novan havenon flanke de la malnova urbo. Tiu haveno situis okcidente de la urbo; la ĉirkaŭaj domoj kaj stratoj estis laŭplane konstruitaj; kaj ne plu hazarde, unu post alia, kiel okazis pli frue. 1489 la urbo estis detruata de la armeoj de Maksimiliano de Aŭstrujo, kiu nuligis ĉiajn privilegiojn. Tiuj estis redonataj en 1500. 1502 nova superfluego detruis ree digojn kaj urbon (signifoplene rilate al la (mal)fortikeco de tiamaĵ fortikaĵoj!) La dua duono de la 16a jc. estis por nia lando la tempo de la religiaj militoj kaj ribelado kontraŭ Hispanujo. Princo Vilhelmo de Oranjo fortikigis O. en 1583 kaj ties filo Maŭrico ampleksigis ĝin en 1587. Arkiduko Alberto konkeris ĝin post sieĝo kiu daŭris pli ol 3 jarojn.

Sekve la urbo estis unu vasta ruinaĵo. Normala komercotrafiko ne plu eblis, ankaŭ ĉar la Hispanoj malpermesis komercon kun la Hispanaj kolonioj. Depost 1650 O. iĝis grava haveno de kaperistoj! Ja, la internacia traktato de Vestfaliao fermis la Skeldon por trafiko.

La situacio estis ŝanĝiĝonta kiam ni apartenis al Aŭstrujo. Ekestis la « Oostenda Kompanio » (kies sidejo estis Antverpeno!) de komercistoj kiuj volis (kaj povis de la registaro) komerci kun la malproksima oriento. Malfeliĉe tio daŭris nur 5 jarojn. La Aŭstria imperiestro cedis por alilandaj minacoj. (1727). En 1780 la imperiestro Jozefo II deklaris O. « libera haveno ». Sekve tre multaj ŝipoj de militantaj landoj vizitis ĝin, tiel ke ĝi plivastiĝis ĝis la nuna « Hazekwartier » (= leporokvartalo). En tiu tempo, kanalo, kies konstruo komenciĝis en la dua duono de la 17a jc., ligis O. kun Brugge kaj Gent. Do, la urbo disvastiĝis laŭlonge de tiu kanalo. Sed en la dua duono de la 19a jc. komenciĝis la ekflorado de la turismo. De tiam la urbo pligrandiĝis laŭlonge de la marbordo. Ĝi ja iĝis la « reĝino de la banlokoj ». Dum la du mondmilitoj la urbo multe suferis. En la unua ĝi estis haveno por la Germanaj submarŝipoj. La Angloj neniigis tiun havenon per la dronigo de ŝipoj ĝuste antaŭ la haveno (i.a. la « Vindictive »). Nun ĝi estas urbo kun menciindaj industrio, komerco, arto, sporto, kulturo kaj mondama vivo.

Drs. F. Roose, Brugge

8-A INTERNACIA SEMINARIO EN NÜRNBERG

27.12.64 ĜIS 3.1.1965

Ĉiujare, la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo estas pli elstara, allogas pli da partoprenantoj, estas pli « internacia », sed precipe ĝuas pli da interesiĝo de ne-esperantistoj.

El Belgio ĉeestis — nome de BEJA — Jeannine Jacobs, Roger Van Humbeeck (ĝen. sekr.) Serge Denoël (vic-prez.) kaj mi (prez.) Pri la Seminario mem. Estas neeble resumi la 14 prelegojn pri la temo « Ideologio kaj Ŝtato — reciproka influo, realaĵoj kaj mitoj », de 10 diversaj prelegantoj. Poste vi trovos la konkludojn de la Seminario. Vere unikaj estis la debatoj post ĉiu prelego, pro la granda diverseco de la partoprenantoj. Post la 1-a prelego de Prof. Lapenna okazis jam vigla diskuto, precipe pri la difino de la vorto « ideologio ». Iom post iom la diskutoj iĝis pli signifplenaj pro la tute klaraj konceptoj kiujn ni ekhavis pri ideologio, ŝtato kaj rilatantaj vortoj.

Ni kvar tre atente sekvis la prelegojn, sed ankaŭ plene profitis alian eblecon de internacia renkonto: havi personajn kontaktojn kun eksterlandanoj. La Belgoj preskaŭ ĉiam estis kunaj, sed okaze de ekskursoj, urbgvidadoj en Nürnberg kaj Fürth, oficialaj akceptoj en la samaj urboj, dum liberaj vesperoj k.t.p., ni ĉiam formis tre internacian rondon.

Dum la silvestra balo, ni ĝuis krom la gajega atmosfero, kelkajn ridigajn skeĉojn. Oni havigis al ni tie la 1-an numeron de « La Gaja Funelista » (Internacia Karnavala Gazeto).

La 2-an ni tre bedaŭris ke ni devis reveni al nia lando, sed la 3-an ni ĝojis kiam ni tamen alvenis hejme, malgraŭ nefunkcianta aŭto, sed dank' al la helpo de Ges-oj Denoël kaj iliaj familianoj en Germanio!


Ivo DURWAEL

KONKLUDOJ DE LA 8A INTERNACIA SEMINARIO

« La 8a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiu okazis en Nürnberg de la 27a de decembro 1964 ĝis la 3a de januaro 1965 kaj havis la temon « Ideologio kaj ŝtato », kunvenigis 127 personojn el 18 diversaj landoj kun tre diversaj konceptoj pri ŝtato, socio kaj ekonomio, al objektiva pritraktado de tiu temo, al kiu esence helpis la uzado de la Internacia Lingvo Esperanto kiel sola laborlingvo en prelegoj kaj diskutoj.

En sia fina kunsido la seminario unuanime akceptis jenajn konkludojn, nome ke ĝi

- 1) KONSTATIS, ke ekzistas tre diversaj konceptoj pri la signifo de la vorto « ideologio », kaj, por havi objektivan fundamenton por la diskutoj, difinis ideologion kiel sistemon de pensoj kaj ideoj pri ekonomia, politika kaj jura organizo de la socio kaj pri konektitaj demandoj;
- 2) pritraktinte surbaze de tiu difino kelkajn konkretajn ideologiojn, ekz. liberalisman demokration, komunismon, faŝismon ktp., KONSTATIS, ke ideologioj ludis gravan rolon en la evoluo de diversaj ŝtatoj kaj esence influis la socian, ekonomian kaj juran strukturon kaj ke samtempe la ŝtato siaflanke kontribuis al plua evoluo de la ideologioj;
- 3) KONSTATIS, ke ankaŭ nun ideologioj ludas gravan rolon en la hodiaŭaj ŝtataj sistemoj kaj interŝtataj rilatoj kaj ke tial oni ne povas pretervidi illan signifon, sed devas objektivite kaj sen antaŭjuĝoj ekzameni illajn originajn, esencajn trajtojn kaj konkretajn manifestiĝojn.»



oostende

47-a kongreso de B.E.f.

5-6-7/6/1965

4-a markola kongreso

pentekosto

ADRESO POR KORESPONDADO

Maertens G. Pr. Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis (Belgujo).

La Urbestro de Oostende, Sinjoro Jan Piers, akceptis la honoran Prezidantecon de niaj du kongresoj !

Krom tiu valora patronado de niaj kongresoj je Pentekosto, ni sciigas ankaŭ ke estas la unua fojo ke la urbestro disponigis la festpalacon por kongreso ! Ni plej inde povas danki la urbon Oostende per multopa ĉesto.

Ni altiras la atenton de ĉiuj esperantistoj en nia lando je tri gravaj eventoj kiuj okazos dum tiu kongreso :

1. **La ekspozicio**, kiu estos malfermata ek de la sabato posttagmezo, por ĉiuj esperantistoj kaj eksterstarantoj, en la halo de la festpalacon : ne nur vi vidos la detale ellaboritan ekspozician materialon de la antverpena grupo « La Verda Stelo », sed ankaŭ la grandegan stokon de libroj pri kiu disponas nia libro-vendejo « Sonorilo ». Por la unua fojo en nia lando vi povos admiri la kompletan kolekton de ĉiuj esperanto — poŝtmarkoj eldonitaj en la mondo ĝis nun, aĉetita de B.E.F. speciale por tiu okazo.
2. **La tendejo** de la skoltaj Esperantistoj ĉe la stacidomo de Oostende; ankaŭ por tie starigi tendejon ni ricevis la permeson de la urbestro de Oostende.
3. La kunveno de la dimanĉo mateno, dediĉota al la **Jaro de la Internacia Kunlaborado** en kunlaboro kun U.N.O.

Krome, pro la markola kongreso, ni garantias al vi la veran internacian karakteron kiun oni nur povas trovi ĉe internaciaj kongresoj de Esperantistoj.

FAVORAJ KONDIĈOJ POR LA JUNULARO

La LKK decidis ke

1. La kursan(in)o malpli ol 25-jara kiu plej bone sukcesis en la postkursa ekzameno, organizata de grupo aliĝinta al B.E.F. aŭtomate kaj senpage enskribiĝas por la Ostenda kongreso; ni petas al la kursgvidantoj informi nin kiel eble plej baldaŭ, sciigante la nomon kaj adreson de la koncerna persono.
2. Ĉiuj gejunuloj malpli ol 18-jaraj pagas kongreskotizon de nur 30 F.

LISTO DE GEPARTOPRENANTOJ (Daŭrligo)

- 62 S-ro J. de Goelj, Rotterdam
- 63 F-ino J.M. van den Hengel, Rotterdam
- 64 F-ino M.T. Henquinez, Leuven
- 65 S-ino Lecat, Antwerpen
- 66 S-ino Meurrens A., Leuven
- 67 S-ro R. Vyncke, Brussel
- 68 S-ino Marmenout, Blankenberge
- 69 S-ro R. De Kegel, Charleroi
- 70 F-ino A. Begodt, Merelbeke
- 71 S-ro H. Boffejon, Brasschaat
- 72 S-ino A. Boffejon, Brasschaat
- 73 F-ino M. Kestens, Brussel

- 74 S-ino Maertens G. Sint Kruis
- 75 S-ro Maertens D. Sint Kruis
- 76 S-ro Maertens J. Sint Kruis
- 77 F-ino M. Deketelaere, Blankenberge
- 78 S-ro Balleux, Deurne
- 79 S-ino Balleux, Deurne
- 80 S-ro Curnelle, Lambersart
- 81 S-ro Blondelle Paul, Sint-Kruis
- 82 S-ro Blondelle Piet, Sint-Kruis
- 83 S-ro Helewaut Yves, Sint-Kruis
- 84 S-ro Lauwers Walter, Assebroek
- 85 F-ino Lauwers Hilda, Assebroek
- 86 F-ino Roose Randi, Brugge
- 87 F-ino M. Henquinez, Leuven
- 88 S-ro de Roover, Borgerhout
- 89 S-ino de Roover, Borgerhout
- 90 F-ino M. Van Mullem, Blankenberge

Aldonis sumon por la informado (B.E.F. - Fondajo)

S-ro Vermuyten 100 F - S-ro De Kegel 50 F - S-ino De Hondt 50 F

S-ino Merckx L. 20 F - S-ro Maertens G. 125 F - S-ro Verstraeten J. 50 F

S-ro Vyncke R. 25 F. Entute 420 F

Ni danke kvitancis tiujn donacojn kaj transdonos la tutan sumon al B.E.F.

LA REDAKCIO PETAS ENSENDONJN POR
LA MAJA - JUNIA numero PLEJ LASTE JE
LA 10.4.1965

KORESPONDANONCO

Cvetana Aleksandrova Ivanova

21 jara instruistino

vilaĝo Ciprocchi Mihajlovgradsko Bulgario

tre deziras korespondi kun iu el nia lando.

Bulgara studentino pri ĝermana filologio deziras korespondi kun iu de nia lando : adreso :

F-ino Radianna Popova, PLOVDIV, str. Kudoglu, 10, BULGARIO.

Bulgara Fraŭlino de 22 jaroj ŝatas korespondi pri muziko, filmartistoj, kolektado de poŝtmarkoj :

Maria BAJALTZALIEVA, « Dospat », 40, SOFIA, BULGARIO.

EKSKURSO AL LILLE

En la kadro de la komerca foiro de Lille, dimanĉe la 9.5.1965, la francaj Esperantistoj kunvenos.

El la tagordo : je la 10 h, prezentado de la filmo « Angoroj » en la foira kinejo — oficiala akcepto, bankedo kaj vizito de la foiro de l' komuna merkato (pli, ol 3500 firmaoj el 21 landoj).

INFORMEJO : Esperanto, 26, rue des martyrs de la Résistance, Lambersart (Nord) Francujo.

Se vi interesiĝas al aŭtobusa partoprenado, aliĝu al la ekskurso organizata de la Esperanto-Junulargrupo Sint-Kruis, Pr. Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis (Dirk en Johan Maertens).

MINIMUMA RESPONDECO

Ĉiuj membroj de nia B.E.F. devus havi minimuman senton pri respondeco koncernante la administradon de nia asocio. Kelkaj personoj kaj precipe la estraro de B.E.F. laboras al interna kaj ekstera reorganizado, sed tio estas nebla sen la kunlaborado de ĉiu membro, kaj precipe de la grupestraroj.

Kial nun tia komunikado: por du kialoj.

Ni petis al vi en la antaŭa numero de Sonorilo, por sendi al la informcentroj (S-ro de Cuyper por la franclingva kaj S-ro Maertens por la nederlandlingva parto) la peticiojn (aŭ almenaŭ la statistikojn) de Universala Esperanto-asocio al UNO. Estis en la estraro interkonsentita ke S-ro de Cuyper sendus la statistikojn al S-ro Maertens kiu raportus en Sonorilo kaj al UEA.

Ni ricevis nur la foliojn aŭ sciligojn el kvar lokoj:

- el Gent, F-ino Terryn kaj S-ro Vandeveldel A.
- el Leuven, Pastro Demaeyer
- el Antverpeno, de diversaj kolektintoj i.a. kun pli ol lo folioj (t.e. 200 subskriboj)

Gesinjoroj Boffejon, Debacker, de Winter, de Roover kaj van Eynde; ni ne volas jam nun doni la ĝustajn ciferojn sed ni certe faros kiam niaj informoj estos pli kompletaj, sed ni jam povas antaŭvidi ke inter tiuj troviĝos la rekordo-kolektantoj;

- el Bruĝo, de diversaj kolektantoj kun S-ro Maertens kiu jam kolektis pli ol 40 foliojn kaj S-ro Roose kiu ricevis, krom la kelkaj individuaj (i.a. tiu de S-ro A. Van Acker, Prezidanto de la ĉambro de reprezentantoj) ankaŭ diversaj kolektivaj.

Pri la kolektivaj subskriboj:

Bond zonder Naam	(110.000)
VTB	(104.000)
Chiro-jeugd	(35.000)
Natuurvrienden	(17.000)
Europa beweging	(6.000)

En la lasta numero de 1964 ni publikigis la kotizojn de izolaj gemembroj, do tiuj kiuj rekte pagas al B.E.F. sed ni aldonis en grasaj literoj, la peton por ke la grupoj sendu la listojn de iliaj pagantaj gemembroj en tri ekz. Tiun peton nur kelkaj plenumis. Bonvolu ĉiam aldoni la naskiĝdaton por junuloj kaj kadetoj.

Kaj ni silentu pri la peto por la alsendo de gazetaltraŭĉaĵoj al la informcentroj? ! Ĝis nun ni ricevis kelkajn de S-ro Verstraeten J., Vicprezidanto, kaj de F-ino Henquinez.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj — Speguloj —
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko
telefono 37.88.20

KRUCVORTENIGMO

SOLVO DE LA PROBLEMO N° 12

Multaj solvintoj: el Antverpeno: S-ino. De Hondt, S-ro. J.R. Van Eynde, F-ino. E. De Coene; el Blankenberge: F-ino. M. Van Mullem; el Bruĝo: S-ro. Iserentant, F-ino. M. Willems; el Bruselo: S-ro. Rob. Vyncke, S-ino. Plyson, S-ino. Elf. Ernst, S-ro. M. Nanquette; S-ro. M. De Neyer; F-ino. Sim. Opsomer; el Gento: S-ro. A. Van de Velde; el Lieĝo: S-ro. Lemme, S-ro. Serge Denoel, S-ino. Montelet-Soyeur; el Lobbes: S-ro. Marc Delforge.
Lotumado havigis la libropremion al S-ro M. Nanquette.

No 13

DIFINOJ

HORIZONTALAJ:

- 1) materialigo de spirito.
- 2) kampmezurist — inversigita muziknoto.
- 3) nomi estro de milita ŝiparo.
- 4) moviĝ' — « tiel » en latina.
- 5) « saluton » en latina
- 6) kiu koncernas apuda(n) civito(n).
- 7) finaĵo — G + ... = « golo » en angla.
- 8) kovri vojon per iu ebena tavolo.
- 9) inventi — sufikso.
- 10) lastfoje jubilei.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

VERTIKALAJ:

- 1) konstantec' de la humoro.
- 2) inversigita nombro — kiel subulo.
- 3) ofte preĝeja ĝarden' — metala ligilo (sen vokaloj)
- 4) V + ... = eljeti — kapabl' krei belon.
- 5) envolvaĵoj de organo.
- 6) A + ... = rita tabl' — kiu koncernas patro(n) de patro.
- 7) ... + ON = Belga urbo — numeralo — surpriziĝ'.
- 8) finaĵo — « reĝo » en franca.
- 9) sorĉaj' — hav' kiel fundamenta principo.
- 10) aŭtoritate ĝustigi.

- N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post iu vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finaĵo.
2) La solvo, aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
3) Sendu NEPRE vian solvon al: Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Bruĝo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.

RECENZOJ

Lajos Tarkony «SOIFO». Poemaro eldonita de «Stafeto» en La Laguna de Tenerife sur la Kanariaj Insuloj : en 1964. 232 paĝoj. Prezo : 2.40 Us. Dol. Eldonnumero : 1.000.

Komencu la «malagrablaj» rimarkoj. Kial la Greklingva kaj Greklitera titolo de la poemo sur p. 161 ne estas tradukita? Ja la Latinlingvaj estas en la komentario tradukitaj. Ankaŭ devis esti komentariaj notoj apud la mitologiaj figuroj. Ja, la libro ne estas destinita al nur kleruloj — specialistoj pri la antikva kulturo. Kaj ne ĉiu devas posedi la librojn kiuj donas la informojn pri tio. Ni devas ankaŭ atentigi pri gramatika eraro. La lasta vorto de la poemo «Liberiĝo» sur p. 73 devas esti libera kaj ne libere. Cetere la antaŭa rimovorto «ribele» povas same esti ribela. Mi ne ŝatas la titolon «soifo» ĉar ĝi estas unu de tiuj multaj Francaj vortoj kiuj tiel sklave estas adoptitaj en Esp., kaj kiuj malagrablas al la oreloj, despli ĉar ili ne estas internaciaj. Tiaj vortoj svarmas en tiu-ĉi libro : drola, fatraso, enorma, koŝmaro, frivola, asidua, aŭstera, koketi, aprezi, degni, orgojlo (nenecesa, ĉar ekzistas malhumileco). Pro tiu tro ofta uzo, la lingvo en la libro pensigas min pri la Germana lingvaĵo uzita en la 18a jarcento ĉe la Prusaj reĝa kortego kaj alta klaso. Kiam oni ankoraŭ trovas «prizono» anstataŭ «malliberejo», oni faras al si la demandon ĉu oni fine kondamnos ĉiujn kunmetitajn vortojn? Mi konsentas ke multaj estis ne sufiĉe precizaj. Sed ĉu oni nun ne troigas en la alia direkto? Sonas ankaŭ malagrabla la ofta uzo de «ĉi», precipe se estas plurfoje tuj unu post aliaj. «Ho, ĉi rigardo lasta, trista, ĉasta, ho, kurta hor' de ĉi pasema kuno...».

En la dua linio, ĉi povis esti sen malavantaĝo anstataŭita per la simpla «la» (p. 33). Mi notis aliajn ekzemplojn.

Ofte la artadmirantoj havas plej malsamajn impresojn de sama artaĵo. Ekzemple. Kontraŭe al multaj kiuj admiras la madonoin de H. Meminc, unu de miaj eksprofesoroj nomis ilin : limonado-madonoj! Nu, ĉi vi volas scii kiun impreson faris je L. Tarkony la fama skulptaĵo de Bernini «La ekstazo de Sta Tereza? Jen ĝi sekvas : Bernini kirlas movojn - de la koket-kompleza angel' orgasm-ekstazas lia marmor-Tereza» (!) p. 95.

Malmultfoje estas iaj psikologiaj strangajoj. Ekz. : en la inventaro kiun la poeto faras depost p. 182 li notis en sia vivo «momentoj kiuj rave raras» (?!). Mi komprenus «momentoj kiuj rare raras! Aŭ oni trovas foje psikologian travivaĵon kiu verŝajne okazis nur al li en la tuta mondo. Ekz., foje li havis «Strabaj Febroj» (?!) p. 87.

MIET WELGERENDE
MAGAZIN VOOR MODERNE HERENKLEDING

in't duifken

GROTE KEUS
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN - SPORTJASSEN - BROEKEN
UNIFORMEN - CABARDIENEN - LODIENS
STIJLVOL HAARWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANEWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

Se mi faris tiujn-ĉi rimarkojn, estas ĉar mi estas tre (tro?) kritikema persono, kaj tre severa je poezio. Sed tiuj rimarkoj malaperas en la tuto de la verko kiu estas tre bela kaj havas multajn kvalitojn. Antaŭ ĉio ni diru ke L. Tarkony estas vera poeto (jes, necesas substreki tion en la amaso da poezia fatraso kiu aperas!); kaj — ankaŭ tre grave — lia poezio estas por ĉiu komprenebla. Meritas ankaŭ multan laŭdon la teksto sur la faldklapo kiun mi supozas esti de la eldonanto J. Regulo Perez. Ĝi tre bone prilumas la figuron L. Tarkony; kaj ĝia aŭtoro trovis la vortojn por esprimi kion ni eble nur sentus. Same la enkonduka poemo «Soifo» estas fidela sintezo de L.T. Ankaŭ la antaŭparolo de Dr. K. Kalocsay estas nepre legenda antaŭ ol komenci la verkon mem. Por la resto de la recenzo mi volas nur citi kelkajn de la multaj kvalitoj. Bonega kreado de atmosfero trafis nin; precipe en «Momentfoto» (p. 27) kaj «Triopa trista gard'» (p. 28-29). La Japaneskaj fotoj (p. 44-46) estas tiel belaj ĉar la aŭtoro metas ion homecan en la naturbildoj, kiu iras ĝis identeco de homo kaj naturo. La tutan romantikon de la 19a jc. oni retrovas en «Pasko ĉe la ruinoj de Visegrad» (p. 58-60), sed ne kun la tiutempa patoso; ĝi estas multe pli realista. Temo kiu en multaj poemoj revenas estas tiu de la soleco kiu premas. «Tombeja krepusko» povis esti pli mallonga. Ĝi estas iom larm-instiga, kaj eĉ banala; sed ĝi havas belan finon (p. 30-32). La poemo dediĉita al mortpafita Helmi Dresen estas tre bela. Ĉu la aŭtoro konis la leteron de la patrino de la kuglomurdita Walter Rathenau al la patrino de la murdinto? Stranga koincido! En la Grekaj mitologiaj fabloj vivas la homaj sopiroj, timoj kaj pasioj. Ĉu pro tio L.T. tiel ŝatas ilin? Ĉiukaze lian «Hellado» mi opinias inter la plej belaj. Mi ne dubas ke L.T. bone konis kaj admiris la Francan literaturon i.a. Ch. Baudelaire. Ĉu sub ties influo kreigis «Inter Rozoj» k.a.? Miaj lastaj rimarkojn koncernas la «Komentoj». La kruc-armeo de infanoj estas ĝenerale konsiderata tie-ĉi kiel legendo. Ĉu ekzistas en Hungarujo indikoj pri historieco de tiu rakonto? «Beghardoj : anoj de komunisma sekto en Belgio (14a jc.)»; kiel tia prezentita, ĝi estas ne nur tro malkompleta, sed ankaŭ ne ĝusta. Tiu movado konsistigis la viran duopon de la beginoj.

p. 225: «cenobito: ĉelloganta monaĥo (kontraste al anakoreto)». Kaj kio estis la anakoreto? Fakte, post malmulta tempo oni donis konfuze la saman nomon al ambaŭ specoj. Sed origine la anakoreto vivis sola; kaj la cenobito iris vivi en dezerto aŭ arbaro, kune kun kamaradoj (cenobito venas el la Greka «koinos bios» = komuna vivo).

Konkludo : jen denove libro kiu honorigas la eldonfirmon «Stafeto». Belega poemlibro por ĉiuj.

Drs. F. Roose Brugge

«Norda Prismo» num. 5-6 de 1964 37 paĝoj. Cefredaktoro : Dr. F. Szilagyi ; Döbelngatan 66, BORAS Svedujo.

Tiu revuo ĉiam agrable surprizas per varia, altvaloro kaj ofte neatendita enhavo. Nun ĝi estas numero dediĉita al la kulturo de... Gronlando! Post la himno de tiu lando, sekvas artikoloj pri ĝiaj literaturo, lingvo, muziko, kutimoj ktp. Se vi volus ion ekscii pri tiu fora kaj nekonata lando, kie serĉi? Jen denove pruvo pri la kultura valoro de Esperanto. Plie, la numero enhavas artikolon de la Dana eksĉefministro V. Kampmann; recenzojn pri «33 Rakontoj» kaj «Maŝinmondo» kaj «Frisaj Rakontoj» ktp. La revuo estas tiel alloga kiel oni nur povas revii.

La recenzitaj libroj estas haveblaj ĉe la librejo „Sonorilo“ (S-ro Iserentant R.)
Kerklaan 61 Brugge. P.K. 152140

**ANTVERPENO
ESPERANTO-GRUPO
« LA VERDA STELO »**

Kunsidoj : Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw » Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. Poŝtĉeknumero : 726.54 Deurne.

La 8an de januaro, la unuan kunsidon de 1965, S-ro Van Vaerenbergh, bona amiko de S-ro H. De Roover, prezentis « Filmajn variaĵojn pri Arto ». Iĝis bilda raportado pri malnova Bruselo, la iama marhaveneto Veere en Nederlando kaj mirinda retrospektivo de l' verkaĵoj de la artpentristo Geert Reusens. Kvankam amatoro, S-ro Van Vaerenbergh sin konatigis kiel veran kineaston kiu same lerte majstris la bildojn kiel la kolorojn, kiel la sonojn kaj vortojn ! S-ro H. De Roover flegis la Esperantan komenton, jen humore, jen tre serioze, sed kiu plej bone konvenas en la arta atmosfero !

La 15an dum la ĝenerala jarkunsido S-ro J. Verstraeten prezentis la moralan raporton de tutjara aktiveco de la grupo dum S-ro R. Balleux sin priokupis pri ĝia financa situacio. La prez. S-ro Maur. Jaumotte lerte komentariis kaj klarigis ambaŭ raportojn kaj dankis ĉiujn kunlaborantojn kiuj iel helpis al la intensa vivado de La Verda Stelo. Poste li transdonis medalojn kaj distingilojn « pro fideleco » al sekvantaj membroj : pro 40 jaroj da fidela membreco : F-ino M. Jacobs, S-ro J. Aug. Faes kaj Marcel Roost. Triope ili ricevis ankaŭ belan artan plaketon pro ilia veteraniĝo. Pro 35 jaroj : S-ro H. Sielens ; pro 20 jaroj : S-ino F. Jaumotte, S-ino R. Lecat, S-ro Ch. Aalders, Ges-roj K. kaj M. Ameryckx, S-ro A. Claes, S-ro W. Dollez, F-ino Bl. Geers, Ges-roj J. kaj B. Jacobs, S-ino Ph. Janssens, S-ro P. Peelman, S-ro R. Torremans kaj S-ro R. Van Eynde ; pro 15 jaroj : F-ino H. Brack, S-ino R. De Soete, S-ino M. Landerwijn, S-ro J. Montmirail, S-ino L. Timmerman, S-ro W. Verdyck kaj Ges-roj Joz. kaj Joh. Verstraeten ; pro 10 jaroj : F-ino E. De Coene, S-ro L. De Marré, S-ro Fr. Goverts, S-ro Fr. Peeters, S-ino M. Roussecu, Ges-roj A. kaj Ph. Van Dessel kaj S-ro R. Van Humbeck. Nome de la ĝebubileantoj S-ro A. Faes, en « vulkana stilo », dankis la Prez. kaj la estraron kaj nome de la grupo S-ro

GRUPA VIVADO

J. Verstraeten akcentis la grandajn meritojn de la Prez. kaj lian majstran gvidadon de la grupo.

Dimanĉon, la 17an oni konkludis la jarkunsidon per bankedo en la salonoj « Magnus », ± 50 Ĝepartoprenantoj — post aperitivo — altablĝis en festaspekta salono por ĝui la diversajn bongustajn kaj abundajn pladojn. La Prez. S-ro M. Jaumotte alvokis al daŭra kaj streĉa laboro por Esperanto kaj anoncis — en la sino de BEF — kreon de fondajo « Jaumotte-Loquet » en kiu li kun edzino donacas 50.000 frankojn. Plue la Prez. konigis sian intencon ek-siĝi kiel Prezidanto post kelkaj jaroj kaj alvokas la verdstelanojn serioze pripensi lian anstataŭigon. S-ro A. Faes afable kaj sprite respondis kaj S-ro R. Jacobs, nome de la bruselaj ĉeestantoj, salutis la verdstelanojn, dankis pro la bela festeno kaj gratulis, siavice, la ĝebubileantojn. Mulpremia tombolo ankoraŭ pliintensigis la festan atmosferon post kiu S-ro H. Vermuyten alportis toston je la sinjorinoj kaj fraŭlinoj en sprita poema formo kaj ilin honorigis en la persono de S-ino Marg. Jaumotte, transdonante al ŝi belajn florojn. Ankaŭ S-ro J. Verstraeten helpis al la festa atmosfero per amuzaj legaĵoj.

La 22an S-ro I. Durwael prizorgis ĝeneralan kaj ampleksan « Rerigardon al la jaro 1964 » en kiu li uzis multajn ilustraĵojn pri la ĉefaj okazintaĵoj de tuta jaro.

London, la 25an la nova elementa kurso komenciĝis, denove gvidata de S-ro H. De Roover kaj kiun S-ro M. Jaumotte malfermis laŭ sia sprita enkonduka paroladeto. Nur 8 ĝelernantoj enskribiĝis : relative malgranda sukceso.

La 29an, dum solena diplomdisdono, 7 ĝelernantoj de la lasta elementa kurso ricevis ateston pri « elementa kapableco » el la manoj de S-ro M. Jaumotte. Estis : F-ino A. Geelen, S-ro W. Van Gulck, F-ino Chr. De Prince, F-ino M. Van Gulck, S-ro L. Elslander, S-ro L. Gaethofs kaj F-ino R. Thibaŭt.

Nome de la ĝelernantoj F-ino A. Geelen dankis la profesoron kaj la grupon kaj transdonis belan libron al la profesoro S-ro H. De Roover. Tiu ĉi lasta, siavice, danke respondis per amikaj kaj sinceraj vortoj. Por kompletigi la vesperon oni regalas ne nur la ĝelernantojn sed ankaŭ la fidelajn ĉeestantojn je belaj Esperante parolantaj filmoj kies prezentadon S-ro R. Van Eynde prizorgis kun granda lerteco.

La 5an de februaro S-ro H. De Roover prezentis paroladon kun lumbiloj pri la flandra verkisto « Ernest Claes kaj ties plej fama libro De Witte ». Iĝis vere flandra vespero en kiu la paroladisto — vikle helpita de la familio Montmirail — sukcesis krei la tipan sferon kiun ĉiu viro rememoras el sia juneco. La speciala maniero per kiu la paroladisto prezentis la tuton estis ege ŝatata de la publiko kiu ne ŝparis sian aplaŭdon. S-ro H. Vermuyten antaŭlegis parton el la libro (tradukitan de S-ino L. Faes kaj aperintan en Belga Antologio - flandra parto) ; lia prelego estis vera juveleto de deklama arto kaj multe helpis al la sukceso de la vespero. Konklude : S-ro H. De Roover povas daŭrigi tiajn paroladojn !

HONORIGO

Kun plezuro ni eksciis la enoficigon de S-ro Roger Jaumotte kiel Prezidanto de la Ruĝ-Kruca sekcio de Wilrijk. Al la dinamika filo de nia Prezidanto ni kore gratulas kaj esprimas la deziron por plena sukceso kaj fruktodona entrepreno. Ni entiras en tiuj gratuloj la edzinon, la filineton, la gepatrojn kaj la bopatrinojn.

AKCIDENTO

Apenaŭ ni sciiĝis pri la akcidento de S-ro F. Schellekens (kies resaniĝo bone evoluas) kaj atingas nin nova malagrabla novaĵo : S-ro M. Du Bois iĝis viktimo de trafika akcidento. Felice ne tiel grava ĉar post kelkaj tagoj la sekvoj jam malaperis. Tamen ni esprimas al nia fidela membro la fortan deziron por kompleta resaniĝo kaj gratulojn por la feliĉa evoluo.

PACO KAJ JUSTECO - BRUGGE

Kunveno ĉiun jaŭdan vesperon je la 20 h en « Middenstandshuis », 't Zand PK n° 9085 96 de A. van Wezel, Brugge

En la lastaj monatoj granda parto de la grupa aktiveco konsistis en laboro por la kongreso de Oostende. Ni

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3
Tel. : 16.89.92

Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

havis ankaŭ la tradician Kristnaskofeston.

Kelkaj ĝemembroj dediĉas sin al kolektado de subskriboj por la peticio. Ni akiris kelkajn interesajn. Por provo ni metis peticifolion en la profesoro-ĉambro de kelkaj lernejoj en Brugge. La rezultato ? En tiuj en kiu unu de ni estas konata, multaj subskriboj ; en la aliaj preskaŭ neniu ! La kaŭzo, kiel unu de la direktoroj diris al ni, estas ke ili, escepte de la nomo, scias nenion pri Esperanto. Kia vastega tereno ankoraŭ por informado !

Inter la aliaj regulaj aktivaĵoj ni citu ke la prezidanto, granda amatoro de literaturo, konigis al ni la originalan poemaron de Lajos Tarkony, kiu vere estas talenta poeto.

Ekstaris kaj jam ageme kaj daŭre laboras la junulara sekcio de nia grupo, kies estraro estas la jena : prez. Paul Blondelle ; vicprezidantino Randi Roose ; sekret. Johan Maertens ; kassistino Hilde Lauwers ; propagandisto Dirk Van Damme ; festdirektoro Roland Vanparrys.

JUNULARGRUPO SINT KRUIS

Prezidanto : P. Blondelle,
Debruynestraat, 67, Sint-Kruis.

Dusemaine okazas la dimanĉon en Schuttershof kunveno ek de la 10-a ĝis tagmezo. Parto de la tagordo estas ĉiam distra, kaj almenaŭ unu horo instruado de nia lingvo. Por la distrado ni aĉetis kun la subteno de nia patrona grupo Paco kaj Justeco « pingpongtablo ». Ni ricevis jam diversajn lecionojn en la ŝakludado gviditajn de Sinjoro Iserentant.

Ne forgesu : la nova kurso komenciĝos dum la libertempo de Pasko : la 9.5.1965 ni vizitas la nordfrancajn Esperantistojn por ĉeesti la Esperantotagon dum la foiro de Rijsel ; zorgu ke ni estas pli multnombre ol la plenkreskuloj !

BRUGA GRUPO ESPERANTISTA, REGA SOCIETO

Poŝtekkonto N^o 4835.33

Leciono de la elementa kurso estis donata dum la unua horo de ĉiu kunveno, kies tagordo ne postulis la tutan vesperon. Krom tio jenaj programeroj estis plenumataj :

La 19an de januaro okazis kunveno de la L.K.K. Ostendo ; utila laboro estis farata prepare al nia kongreso.

La ĝenerala jarkunsido de la grupo okazis la 26an de januaro. Post la kutimaj raportoj : morala fare de la prezidanto, Sro. Ch. Poupeye ; pri la grupa agado farita de F-ino. M. Willems, helpa sekretariino, kiu anstataŭis F-inon. I. Van Parys, sekretariino, malhelpata pro funebro ; kaj financa de la vicprezidanto-kasisto Sro. D. Demeulenacre, la ĉeestantoj reelektis entute ĉiuj senŝange la elirintan komitaton. Interesaj proponoj pri estonta agado estis ekzamenataj kaj fine bela libro estis dislotata.

La 2an de februaro, S-ro. Karlo Poupeye (filo) kompetente paroladis pri organizo de aŭto-rالىo.

« Impresoj pri Verona, Padova kaj Venezia » estis donataj la 9an de februaro, de Sro. Ch. Poupeye, kun projekciado de multaj kolordiapozitivaj kaj elmontrado de memorajoj.

La 16an de februaro, pro multaj malsanoj kaj aliaj malhelpoj, ne povis okazi kunveno, sed la 23an la grupanoj kunvenis en la magazeno « Artkamenio » de la vicprezidantino, S-ino. Verbeke-Vandenberghc, kie Ges-roj De Wasch-Rossel montris belegajn kolektojn de kolordiapozitivaj pri Nord-Italujo, Svisujo, Aŭstrujo kaj ankaŭ... pri Bruĝo.

Plia kunveno de la L.K.K. Ostendo okazis la 25an en « Middenstandshuis ».

PROGRAMO POR ESTONTAJ KUNVENOJ :

Ĉiumarde, je la 20a en « Strijdershuis » Hallestraat, n^o 14, Tel. N^o 347.98. Dum la unua horo : leciono de la elementa kurso ; dum la dua horo :

APRILIO :

6an : Legado kaj komentariado de « Sonorilo »

13-an : Konkurso pri eraraj desegnaĵoj.

20-an : Perfektiga leciono, S-ro Ch. Poupeye.

Jaŭdon 20-22-an : Kunveno de L.K.K. Ostende en « Middenstandshuis ».

27-an : Parolata gazeto.

MAJO :

4-an : Debato « La plej bela tago de Bruĝo »

11-an : Kunveno de L.K.K. Ostendo.

Jaŭdon 13an : Kunveno de L.K.K. Ostendo en « Middenstandshuis ».

18an : Parolado kaj konkurso « La Bruĝaj stratnomoj ».

25-an : Parolado « Oficialaj poŝtmarkoj kun Esp. tekstoj ».

REGA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO

La 7an de Decembro 1964, niaj grupanoj ĝojege festis la Sanktan Nikolaon, en la ĉeesto de la malavara Sanktulo, kiu malŝpareme disdonis donacetojn al la grandaj infanoj. Starigis tiun sukcesplenan vesperon, Sino Fighiera. La 14an : Sro A. Samyn, honore al nia Majstro kaj okaze de la Zamenhofa Vespero, prelegis altvaloran memverkitan verkon. Ĉeestis tiun eksterordinaran eventon grupanoj de la diversaj bruselaj grupoj esperantistaj. La 21an : nia perfektiga kurso. Profesoro Sro van der Stempel, D. daŭrigis sian ĉiumonatan lecionon. La 28an la « Verda Stelo » el Antverpeno delegis ĉe ni rimarkindan trion nome : Sroj R. van Eynde, De Maré kaj H. Vermuyten. Ili alterne parolis pri la vivo kaj la verkoj de Alice Nahon, flandra poetino. Tiukaze Sro Vermuyten prelegis kelkajn poeziojn, kiujn li tradukis esperantlingve.

La 4an de Januaro 1965, okazis la porolata Jurnaloo. Grupo (B) la gajnantino estis Sino Staes, Elly, pro la travivita malnova rakonto « Forlasita Infano kaj Simio ». La 11an : Sro F. Debaene parolis improvize pri sia vojaĝo al Parizo kaj poste niaj grupanoj debatis pri la aktuala temo « La Evoluo de Esperanto en nia Grupo » temo daŭrigota. La 18an Sro van der Stempel, D. daŭrigis sian ĉiumonatan kurson. Tiu-ĉi-foje li al ni instruis longan liston da sinonimoj aŭ pli bone da ŝajnsimilaj vortoj ; kaj la 25an : okazis la malŝarĝo kaj la elekto de la nova komitato.

PROGRAMO POR ESTONTAJ KUNVENOJ :

Ĉiulunde je la 20a en « Monico Nord » 2, Brabantia strato (Rogierplaco) Bruselo-3.

La 15an : Perfektiga kurso fare de Sro van der Stempel.

La 22an : Parolado de Sro Castel.

La 29an : Muzika vespero. (Diskaŭdigo) organizos Sino Fighiera.

manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54



VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj
Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj



PRECIPAJ CENTROJ:

Antwerpen	: Aalmoezenterstr. 2
	Abdijstr. 57
	Anselmostr. 17
	Nationalestr. 87
Arlon	: Marché-aux-Légumes 16
Brugge	: Breidelstr. 8
Brussel	: Galerie d'Ixelles 9
	Anspachlaan 194
Eupen	: Kirchstr. 14
Gent	: Brabantdam 25
Herstal	: Rue Large Voie 4
Leuven	: Bondgenotenlaan 29
Luxembourg	: Place de la Gare 67
Mechelen	: Grootbrug 8
Roeselare	: Ooststr. 124
Tournai	: Rue Royale 75
Turnhout	: Herentalsstr. 6
Verviers	: Pont St. Laurent 2